

Julio de 1990. Foto de la partoprenantoj en la 49a Hispana Kongreso de Esperanto, en Sant Cugat del Vallés. Kelkaj membroj de la E-grupoj de Gijón kaj Avilés partoprenis en ĝi.

La informo pri tiu vizito estis prenita el la 69a numero de HELECO. En tiu sama numero de la revuo estas kelkaj artikoloj pritemante la procezon de politikaj ŝanĝoj tiam okazintaj en la socialista bloko de Orienta Eŭropo kaj ties politikan signifon. En la frontpaĝo de la revuo venis bildo de la afiŝo de la 3a Astura Kongreso de Esperanto kiu tiam estis preparata de la gijonaj samideanoj.

La kongresa programo estis sufiĉe ambicia, se konsideri ke temis pri regiona, ne landa kongreso. Fakte, ĝi enhavis tiom da aktoj kaj programeroj kiel la tritagaj landaj kongresoj. Ankaŭ ĝi estis tritaga, kaj havis ĉiujn elementojn ekzistantajn en la landaj E-kongresoj de la lastaj jaroj. Krome la nombro da partoprenantoj, eĉ se ne tiel granda kiel ties de la landaj kongresoj, tamen estis sufiĉe granda por regiona E-kongreso. Estis kongresanoj ne nur el la esperantistaj grupoj de Asturio sed ankaŭ de aliaj lokoj en la lando: Madrido, Valladolido, Kantabrio, Eŭskadio, Galicio…




Laŭ la tradicia kutimo de la kongresoj de Esperanto, ĉi tiu havis iu "Honora Komitato", en kiu estis la ĉefaj altranguloj kaj aŭtoritatoj, kiaj la Prezidento de la Asturia Princlando, la Urbestro de Gijón, la Direktoro de la Katedro Jovellanos k.a.

La Loka Kongresa Organiza Komitato estis:

-Prezidanto: Santiago Mulas Gallego.
-Sekretario: Julio Argüelles García.
-Kasisto: Ildefonso Domínguez Losada.
-Voĉdonanto: Faustino Castaño Vallina.
-Kunlaboranto: Nicolás Muñiz Alonso.

La kongreso okazis dum la tagoj 12a al la 14a de oktobro de tiu jaro 1990. Estis en ĝi laborsesioj: prelegoj, informado pri la agado de la Esperanto-grupoj de la regiono… Kaj estis ankaŭ la kutimaj distraj programeroj de la E-kongresoj: danc-spektaklo, turismaj vizitoj, meso en Esperanto, bankedo aŭ festa vespermanĝo…

Partoprenis en tiu kongreseto D-ro. Antonio Alonso Núñez, tiama Prezidanto de **Hispana Esperanto-Federacio**. Li prelegis pri la temo: ***"Ĉu nova homa rajto?: la rajto je komuniko"*** en kiu li pritraktis la lingvan problemon de la nuntempa mondo kaj la nekapablon ĝin solvi far de la mondaj instancoj kiuj ne juste privaloras la rolon de Esperanto. Temante pri la ekzistanta komunikad-tipo, li diris ke ĝi iras de supre al malsupre kaj mankas en ĝi la vera interhoma komunikado je ĉiuj niveloj, kiu povas okazi nur tra rekta komunikado pere de komuna lingvo. En la 70a numero de **HELECO**, en kiu oni raportas pri la kongreso, estas ampleksa kaj detala recenzo de tiu interesa prelego kaj la riĉenhava debato kiu sekvis ĝin, en kiu oni pridiskutis la strategiojn per kiuj nia E-movado celu solvi la lingvan ĥaoson kaj la mankon je interkomunikado en la malfavoraj por ni cirkonstancoj de la nuna epoko. Ankaŭ la aliaj prelegoj de la kongreso estas detale recenzitaj en la menciita numero de la revuo.

Alia konferenco, ĉi foje en la hispana lingvo, estis tiu de D-rino. Rafaela Urueña, Profesorino pri Internacia Ĵuro. Ŝi prelegis, fakte, pri la sama